Lucifero. Tie
Sur via tero.
Kain. Kiam?
Lucifero. Ili loĝis
Ĉi tion, kion vi eknomis tero.
Kain. Adamo etas la unua.
Lucifero. Jes,
De via speco, tamen tro malinda
Por esti inter tiuj ĉi la lasta.
Kain. Kaj kio estas ili?
Lucifero. Tio, kio
Vi estos mem.
Kain. Sed kio ili estis?
Lucifero. Vivuloj, plenaj je la vivo, noblaj,
Inteligentaj, bonaj, gloraj, grandaj
Kaj tiel superantaj vian patron,
Se li eĉ estus en Edeno, kiel
Generacio deksesmila via
Superos vin kaj ankaŭ vian filon
En ĝia degenero noktmalluma.
Kaj pri ilia nuna malforteco
Vi mem prijuĝu laŭ viando via.
Kain. Ho ve al mi! Kaj *ili* ekpereis?
Lucifero. Jes, sur ilia tero, kiel vi
Sur via mortos.
Kain. Sed ĉu mia tero
Ilia estis?
Lucifero. Jes.

+ oni nun diras "Karno."

Kain. Ĝi tamen estis
Ne tia kiel nun, estinte certe
Malgranda kaj malvasta por nutradi
Similajn kreitaĵojn.
Lucifero. Jes, ĝi estis
Pli bela.
Kain. Kial do ĝi tiel falis?
Lucifero. Demandu tiun, kiu detruadas.
Kain. Sed kiel?
Lucifero. Per neforigebla forto,
Fatala diskunig' de elementoj
Kaj tiel, ke la mondo refariĝis
Ĥaoso kiel tiu ĉi el kiu
Ĝi estis elfarita. Tiuj ĉi
Aperoj, tre maloftaj en la tempo,
Tre oftaj estas en la eterneco. —
Aliru kaj rigardu la pasintan.
Kain. Terura sceno!
Lucifero. Tamen vera. Vi
Nun vidas ombrojn, kiuj estis iam
El tia ŝtofo kiel vi.
Kain. Kaj mi
Fariĝos kiel ili?
Lucifero. Ke respondu
Vin Tiu, kiu kreis vin. Mi montras
Nur sole tion, kio vin antaŭis,
Sed kio ili *estis*, tion ĉi
Vi sentas tiom malpli kiom pli

Malfortaj estas viaj teraj sentoj
Kaj partopreno je la senmorteco,
Je la prudento kaj je tera forto.
Komuna eco inter vi kaj ili
Nur estas vivo, kiun ili havis,
Kaj morto, kiun vi ekhavos poste,
Aliaj viaj ecoj certe bone
Konvenas al rampaĵoj, naskiĝintaj
El ŝlimo de potenca universo,
Premita tiel ke ĝi planetiĝis,
Loĝita de malfortaj kreitaĵoj,
Feliĉaj pro blindeco kaj Edeno
De malklereco, kie scio estas
Malpermisita kiel venenaĵo.
Rigardu, kio estas, kiuj estis
Ĉi tiuj supraj, belaj kreitaĵoj!
Se tio vin ĉagrenas, vi revenu
Al via tero kaj laboru. Mi
Vin tien revenigos sen danĝero.

Kain. Mi restos tie ĉi.

Lucifero. Kaj kiom longe?

Kain. Eterne. Se mi devas ree iom
Ĉi tien veni, mi preferas resti.
Al mi jam estas abomena ĉio
De la polvaĵo tera. Lasu min
Nun inter l' ombroj.

Lucifero. Ne, ne eble. Vi
Nun vidas l' efektivon kiel revon.

Por kapabliĝi vivi tie ĉi
Vi devas iri tra la samo, kion
Trairis la vidataj kreitaĵoj:
Tra pordo de la mort'.

Kain. Sed kian ni
Trairis?

Lucifero. Tra la mia. Mi promesis
Vin revenigi, kaj spirito mia
Subtenas vin en nuna mondo, kie
Neniu spiras esceptante vin.
Rigardu, — tamen ne esperu vivi
Ĉi tie antaŭ horo definita.

Kain. Ĉu tiuj ĉi fantomoj nun ne povas
Reveni teron?

Lucifero. Ne, *ilia* tero
Pli ne ekzistas kaj ŝanĝiĝis tiel
Ke ili ne rekonus sur suprajo
Eĉ unu lokon, ĵus malmoliĝintan.
Ĝi estis — ho, ĝi *estis* bela mondo!

Kain. Kaj estas nun ankoraŭ. Mi malamas
Ne teron, kuin mi kultivi devas,
Sed tion nur, ke mi ne povas ĝui
Belecon ĝian sen multlaborado,
Ke mi neniam povas kvietigi
Soifon nevenkeblan de sciamo
Kaj meti for la milon de teruroj,
Sentataj pro la morto kaj la vivo.

Lucifero. Vi vidas, kio estas via mondo,

Sed vi ne povas ekkompreni l' ombron
De tio, kio ĝi antaŭe estis.

Kain. Mi vidas kreitaĵojn-grandegulojn,
Fantomojn pli malsuprajn per prudento
(Almenaŭ tiel ŝajnas) ol l' antaŭe
Viditaj, kaj similaj al sovaĝaj
Arbaraj anoj de la tero, kiuj
Terure krias en la nokta horo;
Sed tiuj ĉi dekoble estas pli
Per grandegeco kaj terura vido;
Ilia kresko estas eĉ pli granda
Ol muroj de l' Edeno, kiun gardas
Keruboj, kaj iliaj okulegoj
Brilegas kiel la flamantaj glavoj,
L' armiloj de l' gardistoj de l' Edeno;
La kojnaj dentoj estas kiel arboj
De branĉoj, de la ŝelo senigitaj,
Sed kiuj estis ili?

Lucifero. La mamutoj
De via ter'; sed viaj kuŝas nun
Milionare sub suprajo tera.

Kain. Sed ĉu eĉ unu pli ne vivas?

Lucifero. Ne.
Milito, kiun ili povus fari
Al via malfortega speco tute
Senutiligus la malbeno-diron,
Ĉar vi rapide estus ekstermitaj.

Kain. Pro kio la milito?

Lucifero. Vi forgesis
La diron, vin pelintan el Edeno:
Militojn kontraŭ ĉiuj kreitaĵoj,
Al ĉiu morton, morton sen escepto,
Malsanojn kaj dolorojn: tia estas
La frukto de l' malpermesita arbo.
Kain. La bestoj, kiuj ankaŭ devas morti,
Ne manĝis ja la frukton?
Lucifero. Tamen via
Kreinto diris, ke la bestoj estis
Por vi faritaj, kiel vi por li.
Ĉu volus vi, ke ili vin superu?
Jes, se Adam ne estus ekpekinta,
La bestoj certe ankaŭ ĉiam vivus.
Kain. Ho ve, la malfeliĉaj! Ili devas
La sorton de la patro partopreni
Simil' al liaj idoj, kvankam ili
Ne tuŝis eĉ la frukton, kiel ni,
Kaj ne ricevis scion tiel karan.
Mensogo-arbo! ni *nenion* scias!
Ĝi ekpromesis scion por la morto,
Kruela takso — tamen scio, scio!
Sed kion homo scias?
Lucifero. Povas esti
Ke morto donos la plej supran scion:
Estante io tute kaj plej certa,
Ĝi tial donas al vi certan scion,
Kaj sekve l' arbo diris veron, kvankam

Ĝi donis morton.

Kain. Ho, mallumaj mondoj,
Mi vidas vin, sed mi vin ne komprenas.

Lucifero. Ĉar via horo estas malproksima,
Kaj ŝtof' ne povas tute ekkompreni
Spiriton; sed vi jam ekgajnis iom,
Sciinte tie ĉi pri l' ekzistado
De tiaj regionoj

Kain. Ni jam sciis
Ke estas morto.

Lucifero. Sed ne tion, kio
Ekzistas transe ĝi.

Kain. Mi ankaŭ nun
Ne scias tion ĉi.

Lucifero. Sed vi sciigis
Ke estas stato, statoj krom la via,
Kaj tion ĉi matene vi ne sciis.

Kain. Sed ĉio estas ombro kaj mallumo.

Lucifero. Ne plendu: ĉio estos klarigita
Al via senmorteco.

Kain. Kio estas
Ĉi tiu granda blua fluidaĵo,
Al ondoj similanta! Mi ĝin prenus
Por la rivero, kiu el Edeno
Elfluas preter mia tendo, se
Ĝi ne montriĝus blua kaj senborda.

Lucifero. Sur via tero ankaŭ estas tia
Objekto, nur malgranda. Viaj idoj

Ĉe tia elemento iam loĝos:
Ĝi estas la fantom' de Oceano.

Kain. Ĝi al mondego aŭ fluida suno
Similas. Sed mi vidas kreitaĵojn,
Ludantajn tie sur suprajo brila.

Lucifero. Vi vidas ĝiajn anojn, la antaŭajn
Leviatanojn.

Kain. Kaj ĉi tiu granda
Serpento, kiu la potencan kapon,
Dekoble superantan altan cedron,
Sun levas, kaj videble povus volvi
Sin ĉirkaŭ ĉiuj kuglo, kiujn mi
Antaŭe vidis! Ĉu ne estas ĝi
El speco, kiu tentis la patrinon?

Lucifero. Ŝi mem certege scias plej precize
Pri tiu, kiu tentis ŝin.

Kain. Ĝi ŝajnas
Terura. La alia certe estis
Pli bela.

Lucifero. Ĉu vi ĝin neniam vidis?

Kain. Mi vidis multajn speciojn de serpentoj
Sed ne ĉi tiun, kiu tentis Evon,
Aŭ ian, kiu al ĝi tre similus.

Lucifero. Ĉu ankaŭ via patro ĝin ne vidis?

Kain. Ne, lin ektentis la patrino mem,
Ŝin — la serpento.

Lucifero. Homo, se l' edzino
Aŭ bofilino tentos vin aŭ viajn

Infanojn per novaĵ', sciiĝu, kiu
Antaŭe ilin estis deloginta.

Kain. L' instruo estas tro malfrua: nun
Serpentoj pli ne tentos jam virinon.

Lucifero. Sed estas ja ankoraŭ objektaroj,
Per kiuj vin virinoj povas tenti,
Kaj vi virinojn. Ke infanoj viaj
Sin gardu. Mi al vi konsilas bonon
Eĉ kontraŭ miaj interesoj; certe
Ne sekvos vi, kaj mi nenion perdas.

Kain. Mi ne komprenas.

Lucifero. Kaj vi tial ĝoju.
Tro juna estas vi kaj via mondo.
Vi pensas esti peka kaj dolora,
Ĉu ne?

Kain. Ĉu peka — mi ne scias, sed
Doloroj . . . ho, mi havas ilin multe!

Lucifero. Unuanaskiĝinta homo, via
Pekemo — kaj vi pekis efektive —
Kaj suferado — ĉar vi ja suferis —
Edeno paca estas en komparo
Je tiu stato, kiu vin atendas;
Kaj tiu malfeliĉa stato estas
Edeno en komparo je agado
Kaj doloregoj de postidoj viaj,
Plimultiĝontaj kiel polvo (ĉar
En vero ili tiel multeiĝos).
Sed nun returnen al la tero!

Kain. Kial?
Ĉu vi min forkondukis tien ĉi
Nur pro ĉi tio?
Lucifero. Vi ja serĉis sole
Sciencon.
Kain. Kiel vojon al feliĉo.
Lucifero. Se vero estas tia vojo, vi
Ĝin havas.
Kain. Tiel Di' de l' patro agis
Tre bone ke li l' arbon malpermesis.
Lucifero. Kaj agus multplibone, se li ĝin
Ne plantus. Sed nescio de malbono
Vin ne defendus kontraŭ la malbono:
Ĝi disvolviĝas, partoprenas ĉie,
En ĉio.
Kain. Mi ne kredas — ne en ĉio!
Ne! Ĉar mi celas kaj soifas bonon.
Lucifero. Sed kiu ĝin ne celas? Kiu volas
Malbonon nur pro ĝia maldolĉeco?
Neniu kaj nenio! Sed ĝi estas
Fermento de vivantoj kaj senvivaj.
Kain. En tiun aron da ĉarmegaj kugloj,
Brilintaj de la malproksimo antaŭ
Ni venis en la regnon de fantomoj,
Malbono certe ne eniĝis? ili
Por tio ĉi tromulte belaj estas.
Lucifero. Vi vidis ilin nur el malproksimo.
Kain. Ĉu tio estas grava? Malproksimo

Malpligrandigas nur la helan brilon,
Sendube pli ravantan el proksimo.

Lucifero. Alproksimiĝu terajn kreitaĵojn
Plej belajn, kaj pri ili juĝu tiam.

Kain. Ho, mi jam faris tion ĉi: la plej
Aminda kreitaĵo estas ĉiam
Pli ĉarma el proksimo.

Lucifero. Iluzio!
Sed kia kreitaĵo, rigardata
De plej proksime, ŝajnas por vi esti
Pli ĉarma ol belaĵoj malproksimaj?

Kain. Fratino Ado! Steloj de l' ĉielo,
L' aero blua-nigra de la nokto,
Lumita de rondeto, kiu ŝajne
Spirito aŭ spiritomondo estas;
La multnuancoj de l' vespera tempo,
La bela sunleviĝo kaj foriĝo,
Ne esprimeble rava, pleniganta
L' okulojn per dolĉegaj larmoj, kiam
Mi vidas ĝin, kaj sentas ke la koro
Ĝin sekvas kune kun la belaj nuboj,
Akompanantaj ĝin en okcidenton;
L' arbara ombro kaj la verdaj branĉoj,
La voĉ' de l' birdo, de l' vespera birdo,
Kantanta amon kune kun keruboj
Dum tago mortas post Edenaj muroj, —
Ĉi tio por okuloj kaj por koro
Nenio certe estas en komparo

Je la rideto Ada; mi turniĝus
De l' tero kaj ĉielo por ĝin vidi.

Lucifero. Ŝi estas bela la mortema polvo,
La frukt' de l' juna kreofort', de ĝia
Unua ekfloriĝo kaj aŭroro,
Kaj de unuaj homaj ĉirkaŭprenoj,
Sed tio ĉiam estas iluzio.

Kain. Vi pensas tial, ĉar al ŝi vi estas
Ne frato.

Lucifero. Miaj fratoj estas nur
Spiritoj, ne havantaj posteulojn.

Kain. Vi sekve estas al ni tute fremda?

Lucifero. Min eble parenciĝos viaj idoj.
Sed tamen se vi havas kreitaĵon
Pli belan ol la tuta universo,
Pro kio vi vin nomas malfeliĉa?

Kain. Pro kio mi ekzistas? Kial vi,
Vi mem kaj ĉio estas malfeliĉa?
Eĉ la kreinto devas esti tia,
Li, la kreinto de malfeliĉuloj:
Neniam detruado povas esti
Esprimo de feliĉo; kaj la patro
Lin tamen ĉiam nomas ĉiopova.
Sed se li estas efektive bona,
Pro kio do ekzistas la malbono?
Pri tio mi demandis mian patron,
Sed li respondis ke la malbonaĵo
Nur estas vojo por atingi bonon.

Strangega bono, kiu venas rekte
El la kontraŭo. Mi ekvidis foje
Ŝafidon, ekvunditan de serpento;
La malfeliĉa besto agoniis,
Kaj lia naskintino plende ĝemis.
Kaj mia patro prenis iajn herbojn
Kaj ilin alkuŝigis al la vundo.
La besto baldaŭ rericevis vivon,
Leviĝis kaj patrinan lakton suĉis,
Kaj la patrino treme pro ĝojego
Lekadis ĝiajn membrojn revivintajn,
Kaj mia patro diris min: „Rigardu,
La bono elnaskiĝis el malbono."

Lucifero. Kaj kion vi respondis?

Kain. Mi? Nenion:
Li estas mia patro. Sed mi pensis
Ke multpli bone estus por la besto
Ne havi tute vundon ol aĉeti
La revenigon de l' rompema vivo
Per la sufer' ekstrema, se ĝin eĉ
Forigis tute l' herboj-kuracaĵoj.

Lucifero. Vi diris ke el ĉiuj kreitaĵoj,
De vi amataj, vi preferas ŝin,
Kun kiu vi patrinan lakton suĉis
Kaj kiu ĝin al viaj idoj donas?

Kain. Certege: kio mi sen ŝi fariĝus?

Lucifero. Sed kio estas mi?

Kain. Kaj ĉu nenion
Vi amas?
Lucifero. Kion amas via Dio?
Kain. „Li amas ĉion“, diras mia patro.
Sed mi konfesas: nia sorto certe
Ne pruvas tion ĉi.
Lucifero. Kaj tiel same
Vi ankaŭ nun ne povas certe scii
Ĉu amas *mi* aŭ ne, aŭ ĉu mi eble
Grandegan kaj vastegan planon celas,
En kiu devas ĉiuj aparteroj
Degeli tute kiel neĝaj eroj.
Kain. Neĝeroj? Kio estas tio ĉi?
Lucifero. Vi estas feliĉega, ne sciante
Ĉi tion, kion scios viaj idoj:
Vi ĝoju je klimato sen malvarmoj.
Kain. Eldiru, ĉu vi amas ion, kiu
Similas vin?
Lucifero. Kaj vi, ĉu vi vin amas?
Kain. Jes, tamen mi pli amas tion, kio
Malpligrandigas al mi la enuon
Kaj estas pli ol mi, ĉar mi ĝin amas.
Lucifero. Vi amas ĝin, ĉar vi ĝin trovas bela
Kiele Evo trovis tiun pomon.
Sed kiam ĉesos la beleco, mortos
La amo kiel ĉia kapriceto.
Kain. Beleco ĉesos! Kiel estas eble?
Lucifero. Ĉi tion faras tempo.

Kain. Tamen tempo
Forpasis, sed gepatroj miaj estas
Ankoraŭ belaj, kaj se ne egalaj
Al Ado kaj serafoj, tamen — belaj.
Lucifero. La ĉarmoj nepre iĝos for de ĉiu.
Kain. Mi tion ĉi bedaŭras, sed ne povas
Kompreni ke mi malpli amos ŝin.
Se ŝi belecon perdos, multpli perdos
Kreinto de belecoj ol mi mem,
Vidonta tian ĉarmon ekperei.
Lucifero. Mi vin bedaŭras ami pereemon.
Kain. Mi ankaŭ vin, ĉar vi nenion amas.
Lucifero. Kaj via frato — ĉu vi amas lin?
Kain. Pro kio ne?
Lucifero. Lin amas via patro
Kaj ankaŭ via Dio.
Kain. Ankaŭ mi.
Lucifero. Vi bone kaj humile kondutadas.
Kain. Humile?
Lucifero. Li naskiĝis poste vi,
Sed estas favorito de l' patrino.
Kain. Ke li konservu tiun ĉi favoron,
Ĝin la unua havis — la serpento.
Lucifero. Kaj la favoron de la patro?
Kain. Kial
Ĉi tio tuŝas min? Kaj kial mi
Ne amus tiun, kiun ĉiuj amas?
Lucifero. Eĉ mem Jehovo, tiu ĉi Sinjoro

Bonkora, Li, kreinto de l' Edeno,
De kie li vin pelis for, Li ankaŭ
Al Abel bonridetas.

Kain. Mi neniam
Lin vidis kaj ne zorgas, ĉu li ridas.

Lucifero. Sed vi anĝelojn vidis?

Kain. Nur malofte.

Lucifero. Sufiĉe ofte tamen por sciiĝi
Ke ili amas vian fraton: liaj
Oferoj estas ĉiam tre agrablaj.

Kain. Ke ili estu! Kial vi parolas
Pri tio al mi?

Lucifero. Ĉar antaŭ-nelonge
Pri tio pensis vi.

Kain. Kaj se mi pensis,
Pro kio re elvoki penson, kiu . . .
(Silentiĝas kaj poste daŭrigas maltrankvile.)
Spirito, ni en via mondo estas,
Do ne parolu pri la *mia*. Vi
Al mi vidigis multajn mirindaĵojn,
Sciigis min pri fortaj kreitaĵoj
Antaŭ-adamaj kaj loĝintaj teron,
De kiu nia estas nur rompaĵo;
Vi al mi montris multajn lumajn mondojn,
En kies aro nia mondo estas
Malhela punkto, enĵetita en
La senlimecon de la vivo; vi
Al mi vidigis ombrojn de ekzisto,

Havanta teruregan nomon — Morto,
Al ni de l' patro alportita; vi
Al mi vidigis multon, sed ne ĉion.
Nun montru la loĝejon de Jehovo
Kaj lian paradizon aŭ la vian.
Ĝi kie estas?

Lucifero. *Tie ĉi* kaj ĉie.

Kain. Ĉu vi ne havas hejmon kiel ĉiu?
La polvnaskito havas sian teron,
La mondoj — anojn, ĉia neeterna
Vivulo loĝas en aparta loko,
Vi min eĉ diris ke la kreitaĵoj,
De longe formortintaj, loĝas ie.
Jehovo sekve kaj vi mem . . . Ĉu vi
Ne loĝas kune?

Lucifero. Ne, ni regas kune,
Sed ne kunloĝas.

Kain. Kial ne ekzistas
Nur unu el vi ambaŭ! Tiam eble
La unueco ligus l' elementojn,
Tumulton elvokantajn pro disiĝo.
Kiele vi, spiritoj supre-saĝaj,
Al tiu ĉi disiĝo venis? Ĉu
Ne estas vi gefratoj laŭ esenco
Kaj laŭ naturo, laŭ majesta gloro?

Lucifero. Sed ĉu al Abel vi ne estas frato?

Kain. Ni estas fratoj kaj ni restos tiel,
Sed se ni eĉ disiĝus, kio sekvus?

Spirito ja ne estas korpo. Ĉu
Spiritoj povas esti en malpaco,
Kaj senfineco — kontraŭ senmorteco?
Ĉu ili povas intermalbonigi?
Pro kio?

Lucifero. Pro regado.

Kain. Vi ja diris
Ke ambaŭ vi eternaj estas?

Lucifero. Jes.

Kain. Kaj tiu blua nemezureblaĵo,
Vidita ĵus, ne havas finon?

Lucifero. Ne.

Kain. Kaj vi ne povas ambaŭ regi kune?
Ĉu al vi mankas la necesa spaco?
Pro kio do malpaci?

Lucifero. Ni *kunregas.*

Kain. Kaj unu el vi estas malbonulo.

Lucifero. Kaj kiu?

Kain. Vi! Ĉar se vi povas fari
Al homo bonon, kial vi ne faras?

Lucifero. Pro kio tion ĉi ne faros Li,
Kreinto via? Mi ja vin ne kreis.
Vi estas ja nur liaj kreitaĵoj.

Kain. Se estas tiel, lasu nin en paco,
Nin, „liajn kreitaĵojn“, kiel nomas
Vi nin — aŭ montru al mi vian
Loĝejon aŭ loĝejon *lian.*

Lucifero. Ambaŭn

Mi bone povus al vi montri nun,
Sed poste venos tempo, kiam vi
Vidados unu — dum eterno.

Kain. Kial
Jam ne de nun?

Lucifero. Apenaŭ via homa
Prudento povas nun kompreni klare,
Trankvile tiun malmultaĵon, kiun
Ĝis nun mi montris al vi, kaj vi volas
Kompreni la *duoblan misteregon,*
La *du principojn,* kaj observi ilin
Sur la sekretaj tronoj! Tera polvo!
Limigu do ĉi tiun honoramon!
Por vidi unu el la ambaŭ, nepre
Vi devas morti.

Kain. Ke mi mortu, sed
Ke mi ekvidu ilin!

Lucifero. Mi rekonas
La filon de la pomofrandulino!
Sed vi nur mortos sen ekvidi ilin.
Vi vidos, jes, sed — en alia stato . . .

Kain. De morto?

Lucifero. Ĝi nur estas l' antaŭpaŝo.

Kain. Mi ĝin nun malpli timas, ĉar mi scias
Ke ĝi kondukas al definitaĵo.

Lucifero. Nun mi venigos vin al via tero
Por ke vi povu plimultigi genton

De via patro, manĝi, trinki, tremi
Kaj ridi, plori, dormi, — fine morti.

Kain. Sed kial montris vi al mi objektojn,
De mi viditajn ĵus?

Lucifero. Ĉu vi ne volis
Sciencon havi? Ĉu per la montrito
Mi ne instruis vin — vin mem kompreni?

Kain. Ho ve! mi ŝajnas esti nur nenio.

Lucifero. Ĉi tio estas celo de la homa
Scienco — scii tutan sensignifon
De la mortemnaturo. Tion ĉi
Sciigu nun al viaj posteuloj,
Ĝi ŝparos ilin de multegaj larmoj.

Kain. Spirit' fiera! Vi parolas kun
Malestimego, sed malgraŭe tio
Vi ankaŭ havas estron super vi.

Lucifero. Ne! ne! Mi ĵuras je l' ĉielo, kiun
Li sola tenas, je profundegaĵo,
Je senlimec' de mondoj kaj de vivo,
De mi kaj li regataj kune — ne!
Mi havas — jes — venkinton, sed ne estron:
Al li fleksiĝas ĉio, sed ne mi:
Mi nun daŭrigas lin batali kiel
Mi kontraŭ li batalis en ĉielo. —
En daŭro de la tuta eterneco,
En senfundaĵoj de ĥaoso, ĉie
En sferoj de la spaco senlimita,
En senfineco de centjaroj longaj

Mi kontraŭ li disputos ĉion, ĉion.
Mond' poste mondo, stelo poste stelo
Kaj universo poste universo
Tremigos egalpezon ĝis ĉesiĝos
La disputego, se ĝi nur ĉesiĝos!
Sed tio ĉi ne estos antaŭ lia
Aŭ mia morto. He, sed kio povus
Ekstermi iam nian senmortecon
Kaj nian reciprokan malamegon?
Li, kiel triumfinto, nomos min,
Venkiton, *malbonulo*. Tamen kio
La *bono* estas, kiun kreis li?
Certege se l' venkinto estus mi,
Malbono estus sole *tiaj* faroj. —
Nu, novnaskitaj, kion donis li
Al vi kaj via tero bedaŭrinda?

Kain. Ne multe, tamen ioj el donitoj
Montriĝis tre maldolĉaj.

Lucifero. Nun returnen,
Returnen al la tero ke ĉi tie
Vi ĝuu la aliajn ĉieldonojn,
Al vi kaj viaj idoj definitajn.
La bono kaj malbono estas tiaj
Nur pro esenco de aperoj, sed
Ne pro la volo de doninto ilin,
Se liaj donoj estas bonaj, nomu
Lin bona mem, sed se li malbonigas —
Al mi ne relatigu la malbonon,

Ĝis vi eltrovos ĝian fonton. Juĝu
Ne nur laŭ vortoj, eĉ se ilin diras
Spiritoj, sed laŭ fruktoj de la vivo.
La pom' fatala donis unu *bonon,* —
Prudenton. Ne permesu ke l' minacoj
Tiranaj ĝin sklavigu kaj kredigu
Je tio, kio klare kontraŭiĝas
Al videblaĵo kaj interna sento.
Vi pensu kaj toleru, vi en koro
Internan mondon kreu, se l' ekstera
Ne povas kontentigi vin. Kaj tiel
Vi apudiĝos al spiritnaturo
Kaj venkos vian propran ternaturon.

(Ili malaperas).

Akto III.

Sceno 1.

(La tero apud la paradizo, kiel en la unua akto.)

(Eniras **Kain** kaj **Ado.**)

Ado. Ne bruu, Kain, paŝu pli trankvile.
Kain. Volonte, sed pro kio?
Ado. Nia Enĉjo
Dormiĝis sur folioj, sub cipreso.
Kain. Cipreso! Ho, malĝoja arbo, ŝajne
Ĝemanta super tiu, kiun ĝi
Ombrigas; kial vi elektis ĝin
Por laŭbo al Enoĥo?
Ado. Ĝiaj branĉoj
Detenas kiel nokto sunradiojn
Kaj ŝajne bondefendas lian dormon.
Kain. La lastan — jes! kaj ankaŭ la plej longan...
Aliru ni al li!

(Ili aliras al la infano.)

Li estas bela.
La pura ruĝo de l' malgrandaj vangoj
Konkuras brile je l' delikateco
De rozfolioj, lia bela lito.

Ado. Kaj liaj lipoj, dolĉe disiĝintaj!
Ne, ho ne kisu lin, almenaŭ nun.
Li mem vekiĝos tuj el l' taga dormo.
Kruele estus maldormigi lin.

Kain. Vi estas prava. Mi la koron bridos
Ĝis tiam. Kiel li ridetas dolĉe
En sia dormo! Dormu kaj ridetu,
Vi, heredulo juna de la mondo,
Ne multe pli maljuna ol vi mem.
En viaj tagoj dormo kaj rideto
Nur senkulpeco kaj feliĉo estas;
La frukton vi ne prenis; vi ne scias,
Ke nuda estas vi. Ĉu devas iam
Al vi alveni puno por la krimo,
Je kiu mi kaj vi senkulpaj estas?
Sed antaŭ tiam dormu. — Nun ruĝiĝas
Vangetoj liaj en profunda dormo;
Brilantaj liaj okulharoj tremas
Sur la palpebroj nigraj, kiel tiu
Cipreso, super li balanciĝanta,
Kaj inter-tra okulkurtenoj liaj,
Duonemalfermitaj, elrigardas
Bluaĵo, ridetanta eĉ en dormo.
Li certe songas. Kion? La Edenon?

Jes, sonĝu ĝin, deheridita filo,
Ĝi estas sole sonĝo . . . ĉar nek vi
Nek viaj filoj nek gepatroj vidos
La ĝojegejon, por ni ekfermitan.

Ado. Ne metu, kara Kain, super li
Malĝojajn bedaŭradojn pri l' pasinto.
Pro kio ĉiam ĝemi pri l' Edeno?
Ĉu ni ne povas fari duan?

Kain. Kie?

Ado. Ĉi tie, ĉie: kie ajn vi estos,
Mi ne bezonos la Edenon, tiom
Multege priploritan. Ĉu mi ja
Ne havas vin, la filon, patron, fraton,
La dolĉan Zilon kaj patrinon, kiu
Krom vivo donis al ni tiom multe?

Kain. Jes, ankaŭ morton kune kun cetero.

Ado. Ho Kain, la spirito fierega,
Vin kondukinta for, vin maĝojigis
Ankoraŭ pli. Mi estis esperanta
Ke liaj promesitaj mirindaĵoj,
Ke tiuj, kiel vi rakontas, ombroj
De mondoj, nun mortintaj kaj vivantaj
Vin estas kondukintaj al trankvilo
Kaj kontentiĝo per scienco. Nun
Mi vidas, ke li faris nur malbonon.
Sed mi lin dankas, mi pardonas lin
Ĉar li vin revenigis tiel tuj.

Kain. Ĉu tuj?

Ado. Apenaŭ pasis for du horoj,
Por *mi* du *longaj* horoj, sed laŭ suno —
Du simplaj horoj certe.
Kain. Tamen mi
Al suno proksimiĝis kaj rigardis
Lumitajn kaj pli ne lumotajn mondojn
Kaj kuglojn de neniam eklumitajn,
Kaj ŝajnis — mi rigardis daŭre jaroj.
Ado. Apenaŭ horoj!
Kain. La spirito certe
Posedas sian tempomezurilon,
Kaj li mezuras laŭ vidato, laŭ
Plezuro, laŭ grandaĵ' aŭ malgrandaĵo.
Mi vidis memorindajn faritaĵojn,
Kreitajn de Estuloj senlimitaj,
Restaĵojn de estingiĝintaj mondoj,
Kaj tiam rigardinte l' eternecon,
Mi ŝajnis ke mi prenis al mi ion
De ĝia grandegeco. Nun mi sentas
Denove mian sensignifon. Li
Eldiris veron: mi nenio estas.
Ado. Pro kio li parolis tiel? Dio
Ne diris tion ĉi.
Kain. Ne, li nur faris
Nin polvo kaj, estinte ekflatinta
La polvon per permeso rigardeti
L' Edenon kaj la eternecon, li
Nin repolvigas, — kial?

Ado. Pro la peko
De la gepatroj, vi ĝin scias.
Kain. Kial
Ĝi tuŝas min? ke mortu, kiu pekis!
Ado. Ne bonaj estas viaj vortoj, Kain,
Ne via estas l' eldirita penso:
Ĝi estas de l' spirito vizitinta.
Mi volus morti nur ke ili vivu.
Kain. Mi ankaŭ diras tiel, se nur unu
Ofero povus plene kvietigi
Nesatiĝeblan vivsoifon, ke
L' infano rozovanga, nun dormanta,
Ne konu morton kaj suferojn, ke
Li ne transdonu ilin al naskontoj.
Ado. Ha, kiu scias, ĉu ofero tia
Ne elaĉetos iam ĉiujn homojn?
Kain. Senkulpa oferiĝos pro kulpuloj,
Kaj tio ĉi fariĝos elaĉeto?
Ho jes, ni ankaŭ estas ja senkulpaj!
Ĉar kion ni ekfaris por estiĝi
Oferoj pro fariĝo, kiu estis
Eĉ antaŭ nia elnaskiĝo? Kial
Ni estos devigitaj oferiĝi
Pro tiu krimo stranga kaj mistera,
Se estas krimo — celi al scienco?
Ado. Ho mia Kain, vi eĉ nun kulpiĝas,
Malpia sonas via parolado.
Kain. Se estas tiel — lasu min!

Ado. Neniam!
Eĉ se vin lasus via Dio.
Kain. Kion
Mi vidas tie?
Ado. Du altarojn, kiujn
La frato levis dume vi malestis, —
Por kunoferi post reveno via.
Kain. Sed kial li supozis ke mi estos
Inklina nun oferi kiel li
Kun humilega frunto, kiu multpli
Esprimas timon malfieregantan
Ol kredon — por Jehovon subaĉeti?
Ado. Li faris bone.
Kain. Lin sufiĉas unu
Altaro: mi ne havas oferaĵojn.
Ado. La terproduktoj, belaj, freŝaj floroj
Kaj dolĉaj fruktoj estas bonoferoj
Al Dio, se nur oni ilin donas
Kun kor' humila kaj kvieta.
Kain. Mi
Laboris, plugis, ŝvitis sub la suno
Laŭ volo de l' malbeno. Ĉu mi devas
Ankoraŭ pli? Pro kio mi obeos?
Ĉu pro milit' kun ĉiuj elementoj,
Ke ili al ni cedu nian panon?
Pro kio danki? Ĉu pro tio ke
Mi estas polvo kaj en polvo rampas
Ĝis mem mi refariĝos tia polvo?

Se mi nenio estas, ĉu mi devas
Pro tio, pro nenio hipokriti,
Sajniĝi trovi bonaj suferegojn?
Pro kio do mi devas penti? Ĉu
Pro mia patra peko, jam de longe
Deaĉetita per doloroj, kiujn
Ni jam ĝis nun suferis, kiuj ankaŭ
Pli ol deaĉetitaj estos poste
En daŭro de centjaroj laŭ l' eldiro.
Ĉi tiu infaneto, kiu dormas,
Ne scias ke li en si portas ĝermon
De senlimitaj teraj suferegoj
Por milionoj da mortemaj anoj.
Pli bone estus kapti lin dormantan
Kaj tuj al li frakasi lian kapon
Ol lasi vivi por . . .

Ado. Ha, mia Dio!
Ne tuŝu la infanon, Kain, mian
Kaj vian filon!

Kain. Vi ne timu: mi
Pro ĉiuj steloj kaj pro la potenco,
Reganta ilin, al li ne aliros
Alie ol por patre kisi.

Ado. Ha,
Pro kio do la diro terurega?

Kain. Mi diris ke pli bone estus por li
Ne vivi ol suferi tiom multe
Da doloregoj, kiuj lin minacas,

Kaj testamenti eble pli malbonajn
Suferojn al estontaj kreitaĵoj.
Sed ĉar vin tiaj vortoj malĝojigas
Mi diros sole ke pli bone estus,
Se li neniam estis naskiĝinta.

Ado. Ne diru tiel! Kie estus tiam
La dolĉaj ĝojoj, ĝojoj de patrino,
Gardanta lin, nutranta kaj amanta?
Ne bruu! li vekiĝas! — Mia Enĉjo!

(Ŝi aliras al la infano.)

Rigardu lin, ho Kain! Kiel plena
Li estas je beleco, sano, ĝojo!
Li tiel min similas! ankaŭ vin
En via stato de trankvilo, ĉar
Ni tiam *ĉiuj* nin similas, ĉu
Ne vero, Kain? Ni, patrino, patro
Kaj filo speguliĝas unu
En la alia kiel en la akvo,
Se vi trankvila estas kiel ĝi.
Ho, amu nin, amata Kain! Amu
Vin mem pro ni, ĉar ni vin multe amas.
Rigardu, kiel li ridetas dolĉe,
Altiras siajn brakojn! Kiel li
Malfermas la okulojn por saluti
Vin, lian patron! Kiel la korpeto
Moviĝas pro ĝojego! Metu for
La vortojn pri doloro! La keruboj,
Infanojn ne havantaj, povus vin,

La patran feliĉegon, enviegi.
Ho, benu lin! L' infano ne parolas,
Ne povas danki, sed koreto lia
Ĝin faras, kaj vi sentas tion ĉi.

Kain. Ke estu al vi beno, knabo, se nur
La beno de mortema povas vin
Eksavi de malbeno de serpento.

Ado. Ho certe! Patra beno povas gardi
De ĉiaj ruzoj de serpento.

Kain. Tion
Mi dubas, sed mi tamen benas lin.

Ado. Jen venas nia frato.

Kain. Via frato?

(Abel eniras.)

Abel. Saluton, Kain, mia frato! Al vi
La dia beno!

Kain. Mi salutas, Abel!

Abel. Min diris Ado ke vi forvojaĝis
En kuno kun spirito, kiu vin
Fortiris al neordinaraj lokoj.
Ĉu li similis nian patron aŭ
Spiritojn, jam de ni viditajn?

Kain. Ne.

Abel. Pro kio do vi, mia frato iris?
Li estas eble ia malamiko
De la Plejsupra —

Kain. Kaj amik' al homoj

Ĉu iam la Plejsupra tian econ
Elmontris, se tiele vi lin nomas?

Abel. Tiele vi lin nomas! Viaj vortoj
Hodiaŭ estas strangaj, mia frato.
Fratino Ado, lasu solaj nin.
Ni nun oferos.

Ado. Sed plifrue, Kain,
Vi ĉirkaŭprenu nian karan filon.
Ke lia kvietec' kaj la pieco
De Abel nun pacigu vian koron.
(Ŝi foriras kun la infano.)

Abel. Sed kie estis vi?

Kain. Mi mem ne scias.

Abel. Nek tion, kion vidis vi?

Kain. Mi vidis
Mortintojn kaj sekretojn nemortemajn,
Senfinajn, ĉiopovajn de la spaco,
Mondarojn ekzistintajn kaj estantajn,
Haoson de objektoj penspremantaj,
De sunoj, lunoj, teroj, tondregintoj
Tiele ke mi nun malkapabliĝis
Paroli kun mortemaj. Lasu min.

Abel. Okuloj viaj nenature lumas,
La vangoj havas nenaturan ruĝon,
Kaj la parol' akcenton nenaturan.
Mi ne komprenas . . .

Kain. Vi . . . sed lasu min.

Abel. Ne antaŭ ol ni ambaŭ kunoferos.

Kain. Oferu sola, Abel, mi vin petas,
Jehovo amas vin.

Abel. Nin ambaŭ, Kain.

Kain. Sed vin plimulte; mi ne zorgas tion,
Vi pli kapablas servi lin ol mi.
Vi lin honoru do, sed tamen sola,
Sen mi.

Abel. Ho frato, mi ne estus inda
Min nomi fil' de nia glora patro,
Se mi vin ne honorus ĉiam kiel
La pli maljunan, se mi vin ne petus
Al mi aliĝi kaj antaŭi min
En sankta oferado al Jehovo,
Al vi ĉi tiu rajto apartenas.

Kain. Sed mi ĝin ne postulas.

Abel. Tio ĉi
Min pleje malĝojigas. Mi vin petas,
Oferu nun. Animo via ŝajnas
Posedi iluzion tre danĝeran.
La preĝo trankviligos vin.

Kain. Ho ne!
Nenio nun min povas trankviligi.
Min trankviligi, diris mi? Neniam
Mi sentis la trankvilon, kvankam mi
Ĝin vidis en la elementoj. Frato,
Forlasu min, aŭ tuj mi mem foriros,
Por ke vi faru pie vian servon.

Abel. Nek tion nek ĉi tion: ambaŭ ni
Oferos, ho ne faru al mi honton.
Kain. Se tio devas nepre esti, bone!
Sed kion mi nun havas fari, diru.
Abel. Elektu unu el altaroj.
Kain. Ne,
Elektu mem, ĉar por okuloj miaj
La ambaŭ estas herboj nur kaj ŝtonoj.
Abel. Elektu vi.
Kain. Jen, mi elektis jam.
Abel. Jes, la pli altan, ĝi al vi konvenas,
Al pli maljuna. Prenu la oferojn.
Kain. Sed kie estas viaj?
Abel. Jen, l' unuaj
Naskitoj de brutaroj, tre humila
Ofero de paŝtisto.
Kain. Mi ne havas
Brutaron, mi terlaboristo estas
Kaj povas doni nur ĉi tion, kion
La tero al mi donas: sole fruktojn.

(Li kolektas fruktojn.)

Jen ili estas, tute maturintaj
Kaj multkoloraj.

(Ili kuŝigas la oferojn sur la altarojn kaj metas tien fajron.)

Abel. Mia frato,
Kiele pli maljuna — faru vi

Pli frue ol mi vian preĝon kaj
La dankoferon.

Kain. Ne, en tio ĉi
Mi estas nur novulo. Vi komencu,
Mi vin imitos laŭ kapablo.

Abel (genufleksas). Dio,
Kreinta nin, en nin blovinta vivon,
Vi, nin beninta, pardoninta nin
Malgraŭe nia patra peko, kiu
Perdigus ĉiujn liajn posteulojn,
Se via justemeco ne miksiĝus
Kun via favoreco, kiu estas
Por vi ĝojeg', kaj ne elnaskus por ni
Pardonon, — paradizon en komparo
Je nia krim'! Sinjoro de la lumo,
De bono, gloro kaj de eterneco,
Sen kiu ĉio estas nur malbono,
Kun kiu ni ne povas erariĝi,
Ĉar via voj' neesplorebla nepre
Kondukas homojn nur al bona fino,
Ho prenu l' unuanaskitajn bestojn
De la paŝtisto tre humila. Vere
Ofer' ĉi tiu estas sensignifa
Per si mem; antaŭ vi, Sinjoro, kia
Ofero povas eksignifi ion? —
Sed prenu ĝin kiele dankodonon
De tiu, kiu nun ĝin metas antaŭ
Ĉielo alta via kaj humile

Genuofleksas en la tera poivo,
El kiu li por via gloro venis,
Por glor' de via nomo je eterne.

Kain (starante ne genuflekse apud la altaro).

Spirito! Kiu, kio ajn vi estus,
Eblege ĉiopova — kaj se bona,
Ĉi tion devas pruvi viaj agoj —
Jehov' sur tero! Dio en ĉielo!
Konata certe ankaŭ alinome,
Ĉar viaj atributoj ŝajnas esti
Tre multaj, kiel viaj agoj mem, —
Se oni devas preĝe vin pacigi,
Alprenu nian preĝon. Se vi donas
Favoron pro altar', se oni devas
Vin igi per oferoj, prenu ilin!
Du kreitaĵoj portas ilin al vi.
Se vi preferas sangon, — la altaro
De la paŝtisto, de mi dekstraflanke,
Por via gloro estas kolorita
Per sang' de unuanaskitaj bestoj,
El kies membroj ektremantaj iras
Al la ĉielo sanga timiano; —
Se tiuj dolĉaj fruktoj, kuŝigitaj
De mi sur la verdaĵo pura, freŝa,
Sub suno, kiu ilin maturigis,
Vin plaĉas, ĉar la formo kaj la vivo
En ili ne suferis ian ŝanĝon,
Kaj ili estas pli elektitaĵo,

Montranta viajn agojn ol objekto,
Celanta atentigi vin je l' niaj;
Se tiu ĉi altaro sen oferoj,
Sen sango povas favorigi vin,
Rigardu ĝin. Ĉi tiu, kiu ĝin
Ornamis, estas tiel kiel vi
Lin kreis: li de vi nenion petas
Ekriceveblan per genuofleksoj.
Se li malbona estas, tondru lin,
Vi povas ja, vi estas ĉiopova,
Ĉar kiel li al vi kontraŭstariĝos?
Sed se li estas bona, punu lin
Aŭ ne — laŭ via volo, ĉar de vi
Dependas ĉio, kaj malbon' kaj bono
Nenio estas per si mem, ĉar ili
Estiĝis tiaj nur per via volo.
Ĉu tia ordo estas tute justa
Aŭ ne — mi tion ĉi ne scias: mi
Ne estas ĉiopova nek farita
Por juĝi vian ĉiopovon, sed
Kontraŭe kondamnita por suferi
De ĝi, kaj mi suferis jam sufiĉe.

(La flamo sur la altaro de Abel brile koloniĝas kaj leviĝas ĉielen, dume la altaro de Kain estas renversita de vento, kiu disĵetas la fruktojn.)

Abel (genuflekse). Ho preĝu, frat', Jehov' koleras.
Kain. Kial?
Abel. La fruktoj estas disĵetitaj teron.

Kain. El tero ili venis, ke nun ili
En ĝin revenu! Kaj iliaj semoj
Fruktiĝos ree antaŭ la somero.
Viandofero via pli prosperas,
Avide la ĉielo glutas flamon,
De sango kunmiksita.

Abel. Ho, ne pensu
Pri mia oferito. Reoferu,
Ankoraŭ estas tempo.

Kain. Mi oferon
Ne faros pli, mi ĝin eĉ ne toleros.

Abel (leviĝas). Ha, kion vi intencas?

Kain. Mi renversos
Ĉi tiun nubflatanton, kies fumo
Malsaĝan vian preĝon antaŭiras,
L' altaron, sangkovritan de bestidoj,
Tiritaj for de la patrinaj mamoj
Por esti mortigitaj.

Abel (kontraŭstaras). Lasu ĝin!
Vi ne aldonu al malpiaj vortoj
Malpian agon! Lasu la altaron:
Ĝi sanktaiĝis: la aferon prenis
Jehovo kun plezuro.

Kain. Kun *plezuro!*
Plezuron trovi en vaporo sanga!
En agoni' de korpo! Kia plaĉo
En blekoj plendoloraj de patrinoj,
Ĝemantaj pri idetoj mortigitaj,

En plendoj de oferoj malfeliĉaj,
Konvulsiantaj sub tranĉilo pia!
For, vi atesto sanga, for de l' suno,
Ne faru honton al kreita mondo!

Abel. Ne tuŝu ĝin! Ne tuŝu la altaron
Perforte. Nur se vi deziras ĝin
Por reoferi, vi ĝin povas havi.

Kain. Oferi ree? For, alie estos
Ofero ree . . .

Abel. Kion vi aludas?

Kain. Foriru! Via Dio amas sangon!
Vi gardu vin ke li ĝin ne revidu!

Abel. En lia glora nomo mi min metas
Intere vi kaj la altaro, kiun
Li ekfavoris.

Kain. Se vi amas vin,
Vi iru flanken, ke mi povu meti
L' herbaĵojn sur ilian ter-naskinton,
Alie . . .

Abel (kontraŭstaras)
Mi pli amas Lin ol vivon.

Kain (batas lin sur la tempion per bruletanta rompaĵo de arbo, kiun li prenas de l' altaro)
Nu, donu do al via Di' la vivon,
Se li oferojn amas.

Abel (falas) Mia frato,
Ho, kion vi al mi ekfaris.

Kain. Frato!

Abel. Ricevu, Dio, min, servanton vian,
Kaj lian mortiginton Vi pardonu,
Li ja ne sciis, kion li ekfaris. —
Vi donu al mi vian manon, Kain,
Al Zilo diru . . .

Kain. (Post momento de silento, surprizita.)
Mian manon? Ĝi
Ruĝiĝis kaj koviĝis per . . . per kio?
(Longa silento. Li malrapide cirkaŭrigardas.)
Mi kie estas? Sola . . . Kie estas
Li, Abel? Kie estas Kain? Ĉu mi
En vero estas mi? Vekiĝu, frato.
Pro kio vi ekkuŝis sur la tero?
Ne venis ja la horo por dormiĝi,
Eldiru, kial vi paliĝis tiel?
Vi estis ĵus je vivo plena, Abel!
Mi petas vin, ne moku vi pri mi.
Mi batis vin kolere sed ne morte.
Ha! kial vi vin al mi kontraŭmetis!
Vi certe ŝercas, volas min timigi.
Ĉi tio estis bato, unu bato,
Nenio pli, ekmovu vin, ho faru
Nur unu movon . . . tiel, bone, bone!
Vi spiras . . . faru ke vi spiru . . . Dio!
Ho mia Dio!

Abel (per malforta voĉo).
Kiu diras — Dio?

Kain. Mi, via mortiginto.

Abel. Volu Dio
Pardoni vin. Konsolu, mia frato,
La malfeliĉan Zilon: nun ŝi havas
Nur unu fraton.

(**Abel** mortas.)

Kain. Mi nenian pli!
Sed kio senfratigis min? Li havas
Okulojn malfermitajn, sekve li
Ne mortis, ne; la mort' similas dormon,
Kaj dormo fermas al ni la palpebrojn.
Li ne ekfermis aukaŭ siajn lipojn,
Li sekve spiras . . . strange, mi ne sentas
Ĉi tion . . . Lia koro! lia koro!
Mi ĝin ekpalpos, ĉu ĝi batas . . . ne!
Ĉi tio estas sonĝ', aŭ mi fariĝis
Loĝan' de nova, pli malbona mondo . . .
La ĉirkaŭaĵo antaŭ mi turniĝas.
Sed kio estas tio ĉi? Malseko?
(Metas al lia frunto sian manon kaj rigardas ĝin.)
Sed nun malestas roso. — Sango, sango!
El mi, el li, el ambaŭ! Lia sango,
De mi verŝita! Kion do mi faros
Kun vivo nun, se mi ĝin ŝiris for
De tiu ĉi parenca, frata korpo?
Sed li ne povas esti morta, ne,
Ĉu la silento estas morto? Ne,
Li baldaŭ revekiĝos, mi lin gardos.
La vivo ja ne povas esti tiel

Malforta por ĉesiĝi tiel tuj.
Ĉu li al mi ne diris ion ĵus;
Mi diris al li... Frato, mia frato!
Ne, li je tia nomo ne respondos,
Ĉar frato ja ne batas sian fraton.
Ho, diru, diru, sole unu vorton,
Nur unu vorton per la dolĉa voĉo
Por ke mi povu aŭdi mian propran.

Zilo (eniras). Mi aŭdis bruon. Kion signas ĝi?
Ha, Kain estas apud mia edzo.
Vi kion faras tie, mia frato?
Ĉu li dormiĝis? Dio, kio signas
La palo de l' vizaĝo kaj la — ne —
Ne, tio ĉi ne estas sango, ne,
Ĉar kiu volus verŝi lian sangon?
Ho, Abel, kiu faris al vi tion?
Li ne moviĝas, li ne spiras pli,
Kaj liaj manoj falas for el miaj
Kaj estas malsentemaj kiel ŝtono.
Ha, Kain, kruelega, kial vi
Ne venis ĝustatempe por lin savi?
Ho, kiu ajn atakus lin, vi estis
Pli forta, kaj vi povis ĵeti vin
Intere li kaj lia kontraŭulo.
Ĉi tien, patro, Evo, Ado! Kuru,
La morto estas en la mondo!

(**Zilo** foriris vokante.)

Kain (sola). Kiu

Ĝin enkondukis? Mi! Mi, kiu tiel
Abomenegas nomon de la morto
Ke eĉ la pens' pri ĝi al mi venenis
La vivon antaŭ jam ol mi ĝin vidis;
Mi tiris ĝin ĉi tien kaj enĵetis
En ĝiajn brakojn mian fraton, kvazaŭ
Sen mi ĝi ne anoncus siajn rajtojn.
De l' sonĝo mi vekiĝis nun. Terura,
Terura sonĝo delirigis min.
Sed li, neniam li vekiĝos pli!

(Alkuras **Adam, Evo, Ado** kaj **Zilo**.)

Adam. Dolorokri' de Zilo min altiras . . .
Sed kio estas tie ĉi? Ĉu eble?
Ho, filo, mia filo!
(Al **Evo**.) Ha, virino,
Jen la serpenta frukto kaj la via!

Evo. Ho, ne parolu nun pri tio ĉi:
Pikilo de l' serpento tranĉas min
Sen tio en la koro. Mia Abel,
Amata filo! Preni lin de mi!
Tro granda puno por patrina peko!

Adam. Sed kiu, kio faris la mortigon?
Eldiru, Kain, vi alestis ja.
Ĉu ia malamiko de Jehovo
Aŭ besto de arbar'?

Evo. Terura lumo
Min trafas kvazaŭ el tondrantaj nuboj!

La sanga arbrompaĵo de l'altaro,
Tut-nigra de la fum' kaj ruĝa de . . .

Adam. Parolu, mia filo, pruvu nin
Ke l' malfeliĉo ne ekfrapis nin
Ankoraŭ pli.

Ado. Parolu, Kain, diru,
Ke tio ĉi ne estis tute *vi*.

Evo. Ne, tio estis li! Mi vidas klare.
Jen li mallevas sian kulpan kapon,
Li kaŝas la okulojn sovaĝegajn
Per sangiĝintaj manoj.

Ado. Ha, patrino,
Eraro! Kain! Vi pravigu vin
De la suspekto terurega, kiun
Doloro tiras nun de la patrino.

Evo. Jehovo, aŭdu min! Ke la malbono
De la serpento pendu nun sur li!
Li estas ĝia ido pli ol nia.
Ho, ke lin trafu malespero . . .

Ado. Haltu,
Patrino, ne malbenu lin! Patrino,
Li estas via filo, mia frato,
Li estas mia edzo . . .

Evo. Kaj li rabis
De vi la fraton kaj de Zilo l'edzon.
Mi pli ne havas filon! Mi forpelas
Lin de okuloj miaj je eterne!
Mi rompas ĉian ligon inter ni

Kiele li ĝin rompis en ĉi tiu . . .
Ha, morto, morto, kial vi pli frue
Ne prenis min, falintan la unua?
Pro kio vi ne prenas for min nun?

Adam. Ke via justa dolorego, Evo,
Ne malpiigu vin. Al ni de longe
Punego estas profetita. Se
Ĝi komenciĝas, montru ni al Dio,
Ke ni obeas lian sanktan volon.

Evo (fingremontras al Kain).

Ne, *lian volon!!* . . . Diru vi: la volon
De tiu ĉi demono korpiĝinta,
De mi naskita ke li povu semi
En mondo morton. Ĉia malbenaĵo
De vivo trafu lin. Ke turmentegoj
Lin pelu en dezerton, kiel ni
Pelitaj estis el la paradizo,
Ĝis liaj idoj, liaj propraj idoj
Lin agos tiel same kiel li
La fraton agis. Ke l' kerubaj glavoj
Persekutadu tage-nokte lin!
Serpentoj nasku sin sub liaj paŝoj!
En lia buŝo fruktoj ekcendriĝu!
La arbfolioj, kie li kuŝigos
La kapon, tuj pleniĝu je skorpioj!
Li ĉiam sonĝu pri ofero sia,
Kaj tim' je l' mort' vekiĝo lia estu!
Ke l' riveretoj puraj sangoiĝu,

Se ilin li makulos per la lipoj!
Ke ĉia elemento lin allogu
Kaj ĉiam trompu! Ke li vivu inter
Turmentoj, mortigemaj por aliaj!
Ke morto estu por li pli malbona
Ol morto, kiun li al ni kondukis.
Fratmortigulo! Ke ĉi tiun vorton
De nun anstataŭigu nomo *Kain*
En buŝo de generacioj postaj,
Abomenontaj vin, ilian patron!
Ke sub piedoj viaj velku herboj,
Arbaro vin rifuzu je rifuĝo,
La tero je loĝej', la polv' je tombo,
La sun' je lumo, la ĉiel' je Dio.

(**Evo** foriras.)

Adam. Foriru, Kain! Ni pli ne kunloĝos,
Vi lasu min nun kun mortinto mia,
Mi restas sola. Ni nin pli ne vidos.

Ado. Ho patro, vi lin tiel ne forlasu,
Ne pligrandigu al li la malbenon
Teruran de l' patrin'.

Adam. Mi ne malbenas.
Malbeno estas nur en lia koro.
Ni iru, Zilo.

Zilo. Mi la korpon gardos
De mio edzo.

Adam. Iru, ni revenos

Pli poste, se li estos foririnta,
Li, la kreint' de nia nigra zorgo.

Zilo. Ankoraŭ unu kison al la korpo,
Sur lipojn iatempe tiel rozajn,
Ho mia koro! mia koro!

(**Adam** kaj **Zilo** foriras plorante).

Ado. Kain,
Ni devas for. Vi aŭdis ilin. Mi
Jam estas preta, kaj l'infanoj ankaŭ.
Mi portos Enĉjon, vi — fratinon lian,
Kaj antaŭ ol la suno malleviĝos
Ni iros de ĉi tie, por ne marŝi
Tra la dezerto sub la noktoombroj.
Parolu, diru vorton, mia edzo.

Kain. Forlasu min!

Ado. Ho ve! Sen tio ĉi
Vin ĉiuj lasis sola.

Kain. Kial do
Vi restas? Ĉu ne timas vi kunesti
Kun ulo de krimego tia?

Ado. Ne,
La plej terura estas — vin forlasi
Kiele ajn mi timus vian agon,
Senfratigintan min. Sed mi pri ĝi
Silenti devas. Via ago estas
Nur inter vi kaj Dio.

Voĉo. Kain! Kain!

Ado. Ĉu vi ekaŭdis voĉon?

Voĉo. Kain! Kain!

Ado. Ĉi tio estas voĉ' anĝela.

(Anĝelo de l' Sinjoro eniras).

La anĝelo. Kie
Troviĝas via frato Abel, diru?

Kain. Ĉu estas mi gardanto de la frato?

La anĝelo. Vi kion faris, Kain? Lia sango
Kriegas al la trono de l' Sinjoro.
Vin nun malbenas mem la tero, kiu
Malfermis sian buŝon por enpreni
La sangon, ĵus de vi verŝitan. Nun,
Se vi ĝin prilaboros, ĝi ne cedos
Facile al penado via. Vi
De nun sur tero ĉiam vagabondos.

Ado. La puno estas super liaj fortoj:
Vi pelas lin for de la tervizaĝo,
Kaj Dio sin de li turninta estas.
Li vagabondu? Sed l' unua, kiu
Renkontos lin, mortigos lin.

Kain. Ĉi tio
Ne estas malvolinda. Sed la tero
Dezerta estas, kiu min mortigos?

La anĝelo. Mortigis vi la fraton, kiu vin
De via filo savos?

Ado. Ha, anĝelo!
Pardonon! Ve! Ne diru, ke ĉi tiu
Malĝoja brusto nutras mortigonton —
La mortigonton de la propra patro.

La anĝelo. Li tiam nur similus sian patron.
Ĉu Evo ne elnutris tiun ĉi,
Per sango makulitan? Fratmortigo
Tre bone povas naski patrmortigon.
Sed tio ĉi ne estos. La Sinjoro
Venigis min al Kain por sur lin
Sigelon meti por defendi lin:
Sepobla venĝo trafos ĉiun, kiu
Al Kain portos morton. Apudiĝu!

Kain. Vi kion volas?

La anĝelo. Mi sur via frunto
Signigos ke vi estu ne agata
Tiele, kiel estis via frato.

Kain. Ne, lasu min formorti.

La anĝelo. Ne, neniel!

(La anĝelo metas la signon sur la frunto de Kain).

Kain. La frunto fajras. Sed ne tiel, kiel
Animo mia tie en interno.
Sed ĉu vi finis? Mi ne kontraŭstaras.

La anĝelo. Ankoraŭ sur la brusto de l' patrino
Vi estis malmolega kiel tero,
Devanta de vi esti laborata,
Kaj Abel estis ĉiam dolĉkvieta
Simile al de li paŝtitaj ŝafoj.

Kain. Mi estis ĝermigita tro rapide
Post la fatala fal' de la gepatroj.
La koro de l' patrin' ne havis tempon

Forgesi tute-plene la serpenton,
Kaj mia patro ĝemis pri l' Edeno.
Mi estas tia, kia mi nun estas.
Mi vivon ne demandis nek min kreis;
Sed se mi povus vivon de la frato
Per mia propra morto deaĉeti —
Kaj kial ne? — Ke li denove vivu
Kaj mi anstataŭ li ĉi tie kuŝu
En mia sango — tiel estus nun
Al Dio konservita vivo, kiun
Li multe amas, kaj de mi prenita
Netolerebla ekzistado.

La anĝelo. Kiu
Detruos la mortigon ekfaritan?
Farito estas ja farito. Iru
Kaj vivu plue kaj ke viaj agoj
Al via lasta faro ne similu.

(La anĝelo malaperas).

Ado. Li estas for. Ni iru nun. Mi aŭdas
Enoĉjon plori.

Kain. Li ne scias, kial
Li ploras. Sed la sangverŝinto, mi
Ne povas plori nun. La kvar riveroj*)
Ne povos lavpurigi min. Ĉu vi
Esperas — mia filo volos min
Rigardi?

---

*) Tiuj ĉi kvar riveroj fluis ĉirkaŭ la Edeno kaj sekve estis la solaj sur la tero, pri kiuj Kain scias.

Ado. Ho, se mi alie pensus . . .
Kain (interrompas ŝin).
Sufiĉe da minacoj! Ni ĝis nun
Tro aŭdis ilin. Prenu la infanojn,
Mi sekvas vin.
Ado. Mi vin ne lasos sola
Kun la mortinto.
Kain. Ho, atesto, vi
Malviva kaj eterna, kies sango
La teron kaj ĉielon nigras. Kio
Vi estas nun, ne scias mi. Sed se vi
Nun vidas, kio estas *mi*, mi pensas
Ke vi pardonos tiun, kiun Dio
Nek mia propra kor' pardonos iam.
Adiaŭ: mi ne devas, mi timegas
Tuŝeti tion, kio dank' al mi
Vi nun fariĝis. Mi, kun vi veninta
El unu sama fonto kaj suĉinta
La tiun saman lakton, kian vi,
Mi, kiu premis vin al mia koro
Kun amo frata kaj infana, mi
Vin pli ne devas vidi, mi eĉ timas
Al vi ekfari tion, kion vi
Por mi neprege farus — enkuŝigi
Restaĵojn viajn en l' unuan tombon,
Por homo ekfositan. Ho, sed kiu
Malfermis tiun tombon? Tero! Tero!
Por ĉiuj viaj fruktoj, kiujn vi

Al mi donadis, mi nun donas lin. —
Ni iru al dezerto!
(Ado genufleksas kaj kisas la korpon de Abel).

Ado. Kia fino
Kruela, tro frutempa, mia frato!
El ĉiuj, kiuj vin priploras, mi,
Mi sola vin ne arogantas plori:
De nun mi devas plorojn nur sekigi,
Sed ne elverŝi. Tamen el ĝemantoj
Neniu ĝemos tiel, kiel mi —
Ne nur pri vi! pri l' mortiginto ankaŭ. —
Nun, Kain, mi la ŝarĝon partoprenas,
Premantan vin.

Kain. Ni iros orienten
De l' paradizo: tie estas lando
Sovaĝa, kiu al mi bonkonvenas.

Ado. Antaŭe iru, estu la gvidanto!
Ke nia Dio estu ankaŭ via.
Nun ni l' infanojn prenu.

Kain. Kaj *ĉi tiu*,
Li estas seninfana. Mi ekŝtopis
La fonton de infanoj piaj, kiuj
Tuj ekbeligus lian edzan liton,
La kunmiksiĝo de infanoj liaj
Kun niaj povus iom kvietigi
Sovaĝan mian sangon kaj . . . Ho Abel! . . .

Ado. Ke paco estu al li!

Kain. Sed al *mi?*

FINO.



KAIN

de lord Byron.

Kain estis skribita de lord Byron kiam li loĝis Ravennon en 1821. La mistero estis komencita la 10-an Julion kaj finita en Septembro. En Decembro de tiu sama jaro ĝi estis eldonita unutempe kun alia granda verko de la poeto, scie kun *Sardanapal.* Ĉar la eldoninto de verkoj de Byron, Murray, antaŭvidis kiele la plimulto da anglaj legantoj ricevos la misteron, li petis la poeton ellasi kelke da partoj, precipe el la 2-a akto *(Regno de ombroj).* Byron rifuzis absolute. »Lucifero«, faris li la rimarkon, »ne povas sentenci kiel londona ĉefepiskopo.« Tiel la mistero estis presita sen iaj kompromisoj. La impreso, farita de ĝi en la amikoj kaj malamikoj de la aŭtoro,

estis grandega. »En Anglujo, diras la eminenta kritikisto G. Braudes, oni rigardis la aperon de *Kain* kiel veran popolan malfeliĉon.« La plimulto da kritikistoj atakis Byron'on per pasiaj insultoj; aliaj, konfesante ke la verko mem estas plenmajesta, tamen sentis teruron de ĝia karaktero. Sed tio ĉi ne estis kaŭzo por malhelpi al *Kain* disvastiĝi per multaj eldonoj kaj eĉ eliri en mondon kontraŭleĝe sen permeso de la rajthavanta eldonisto. Kiam Murray turnis sin al la lord Eldon petante defendi siajn eldonrajtojn, li estis rifuzita: *Kain* estis opiniata verko ekster la leĝoj. Tamen aliaj pli grandaj kritikistoj havis alian opinion. Walter Scott, al kiu la mistero estis dediĉita, komparis la verkon je la *Perdita Paradizo* de Milton. La granda poeto kaj amiko de Byron, B. Shelley, skribis en sia privata letero: »Mur rilatigas al mi la tonon, per kia *Kain* estas skribita. Mi petas vin, konvinku Mur'on, ke en tio ĉi mi neniel povis influi lordon Byron'on . . . *Kain* estis ĝermita kaj komencita de longe antaŭ mi renkontis Byron'on en Ravenno. Kiel mi estus feliĉa se mi estus povinta eĉ malrekte rilatigi al mi la partoprenon je tiu ĉi nemortema verko!« »*Kain*,« skribis al Byron lia alia amiko kaj poeto, Thomas Moore, »estas mirinda, timigema; li neniam estos forgesita. Se mi ne eraras, li profunde eniĝos en korojn de homoj.« Sed la plej entuziasma kritika rimarko estis farita de la plej granda poeto de l' mondo, de tia kritikisto, kies kompetenteco ne

povas esti dubebla. Tio ĉi estis Goethe, kiu diris ke dube estos kreita per la homa genio dua verko, egala laŭ forto je *Kain*. Laŭ lia opinio la 1-a sceno de la 2-a akto estas el nombro de tiaj verkoj, super kiuj la poezio ne povas leviĝi. Tial, bedaŭrante post la morto de Byron (1824) la trofruan foriron de tia homo, Goethe esprimis ke por la poezio tiu ĉi morto estas sen signifo. »Byron«, li diris, »atingis jam la supron de la kreadforto, kaj kion ajn li skribus poste, li ne povus transiri la limojn, ĉirkaŭintajn lian talenton.« Kaj li konsilis siajn kunlandanojn ellerni la anglan lingvon speciale por havi eblon legi *Kain'on* en la originalo.

Kain prezentas la plej belan esprimon de la potenca poezio, direktita al batalo kaj protesto; poezio, kies granda kreinto estis Byron kaj kies pentraĵon faras Brandes per jenaj belaj esprimoj: »Ĉia vorto de Byron senescepte estis aŭdita sur la tero, kaj ĉiuj migrintaj kaj pelitaj, ĉiuj premitaj kaj malicigitaj turnis siajn rigardojn sur la solan homon, kiu en tempo de komuna malleviĝo de intelegentuloj kaj dispeciĝo de karakteroj restis nevenkebla kaj bela kiel Apolo, kuraĝa kiel Aĥilo, fiera kiel ĉiuj potenculoj de Eŭropo.“ »*Kain*«, daŭrigas tiu ĉi sama kritikisto, »estis skribita ne per febra rapideco, kiun faras enspiro; la verko disĵetas nek tondrojn nek fulmojn. Byron komprenis ke estas bezono por li solvi problemon, kiu por pasiaj naturoj estas plej

malfacila kaj samtempe ĉefa esenco de la moralo: »kanaligi« sian pasion, t. e. doni al ĝi utilan direkton. Tiu ĉi verko estas laboro de pensemulo, laboro de malrapide pereiganta pensado, frukto de analizema spriteco, detruanta ĉiujn argumentojn de penseco. La tuta peciga detruema forto de la prudento, tiel videble reganta tie ĉi kaj aganta per tia certigeco, estas movata per potenca kaj fajra fantazio, kaj en la profundaĵo de tiu ĉi forto estas kaŝita la granda animo de la poeto. — Ĉiuj duboj kaj demandoj de Byron spiras per tia freŝeco ke oni povas rilatigi ilin al la unua homo, kiun demandoj kaj duboj komencis turmenti la unuan fojon. Metante en la buŝon de la unua indigniĝanta kreitaĵo ĉiujn dolorojn, kiuj sin kolektis en daŭro de centjaroj, ĉiujn turmentojn, suferitajn de la liberema homa prudento sub premado de persekutoj, li esprimas tion ĉi per tia simpla kaj naiva maniero, kiel se la tuta laborado de milionoj da homoj estis jam plenumita per tiu unu pensema kapo de *Kain*. Tiu ĉi potenca kontraŭaĵo ĵetas sin en okulojn antaŭ ĉio, kiam oni legas poemon."

»Kompreneble Byron ne intencis skribi ian blasfemaĵon, kaj certe estus malprudente kritiki la Supran, Ĉioenhavantan Ekzistaĵon. En *Kain* Byron batalas nur por la ideo ke la ordo, ekzistanta en la naturo, havas etikan karakteron kaj ke bono, anstataŭ esti celo de homa vivo fariĝis sole ĝia pero. Li parolas kun doloranta koro pri la senlima maldolĉeco de l'

homa ekzistado. En la fundamento de tiu ĉi verko ne estas pesimismo, kiel oni nomas tiun ĉi senton tute sensignifmaniere, sed nur profunda sento rilate fatalajn homajn dolorojn. En la animo de Byron malestas malico kontraŭ la universa forto, kreanta nur por detrui; en ĝi kontraŭe vivas profunda senlima kunsento je la komuna malĝojo malhelpebla kaj neforkurebla.“ *)

---

*) Georg Brandes „Byron kaj liaj verkoj.“



Eraro.

Sur la paĝo 35ª, linio 9ª de sube

estas presita: *ekgravinte*

anstataŭ: *gravurinte.*